TRIA KARESMA DIMANĈO – 7a de marto 2010

SE VI NE PENTOS, VI ĈIUJ TIEL SAME PEREOS – Komentario al la Evangelio de P. Alberto Maggi OSM

Lk. 13, 1-9

Kaj ĉeestis en tiu sama tempo iuj, kiuj rakontis al li pri tiuj Galileanoj, kies sangon Pilato miksis kun iliaj oferaĵoj. Kaj responde li diris al ili: Ĉu vi pensas, ke tiuj Galileanoj estis pekuloj pli ol ĉiuj Galileanoj, pro tio, ke ili tion suferis? Mi diras al vi: Neniel; sed se vi ne konvertiĝos, vi ĉiuj tiel same pereos. Aŭ pri tiuj dek ok, sur kiujn falis la turo en Ŝiloaĥ kaj ilin mortigis, ĉu vi pensas, ke ili estis pekuloj pli ol ĉiuj homoj, kiuj loĝis en Jeruzalem? Neniel, mi diras al vi; sed se vi ne konvertiĝos, vi ĉiuj ankaŭ pereos.

Kaj li parolis la jenan parabolon: Unu viro havis figarbon, plantitan en lia vinberĝardeno, kaj li venis, serĉante frukton sur ĝi, kaj ne trovis. Kaj li diris al la vinberisto: Jen tri jarojn mi venas, serĉante frukton sur ĉi tiu arbo, kaj mi ne trovas; elhaku ĝin! kial ĝi senutiligas ankaŭ la teron?

Sed li responde diris: Sinjoro, lasu ĝin resti ankaŭ ĉi tiun jaron, ĝis mi fosos ĉirkaŭ ĝi kaj metos sterkon; kaj se ĝi poste donos frukton, bone; sed se ne, vi elhakos ĝin.

Kion oni faras al Jesuo estas averto kun klara koteria senco. Ni vidu. La evangeliisto skribas ke "en tiu sama tempo…", tamen kiu estas tiu sama tempo? Jesuo estas liberiganta la homamason de la farisea influo. Fakte Li jam invitis ilin: "Kial vi ne juĝas vi mem pri kio estas justa?"nome Li invitis ilin havi prudenton kaj memdecidon por pensi per sia menso mem, sen bezono ĉiam dependi de la juĝo de la fariseoj aŭ de la religiaj aŭtoritatuloj.

Nu ĝuste en tiu momento, alproksimiĝas iuj kaj rakontas al Li "pri tiuj Galileanoj, kies sangon Pilato miksis kun iliaj oferaĵoj". En la tempo de Jesuo diri "Galileanon", ne indikis la nuran devenon el tiu regiono, sed signifis ankaŭ diri "ribelulon, agitiĝemulon", "batalemulon". La Galileanoj estis plejparte la zelotoj, tiuj kiuj pere de la violento ribelis al la romia povo.

Tiam al Jesuo kiu estas Galileano ili diras: "Vidu ke tie ĉi la Galileanoj trafas malbelan finon! Vidu kiel Pilato ilin masakris!" Kaj ni ne forgesu ke unu el la eminentuloj, kiu estis konsiderita kiel mesio estis Judaso la Galileano kaj lin trafis malbela fino.

Nu, Jesuo ekparolas, kaj antaŭ ĉio li malkonfesas tiun religian kategorion pro kiu ekzistus puno pro la peko, kaj, ĉikaze, la mortopuno. Do, Jesuo diras: "Ĉu vi pensas, ke tiuj Galileanoj estis pekuloj pli ol ĉiuj Galileanoj, pro tio, ke ili tion suferis?".

Do, Jesuo neas ĉiun ajn kunligon inter la peko kaj la puno. Kaj poste jen la invito al tiuj ĉi kiuj diris al li: "Se vi ne ĉesas tiel agi, se vi ne foriras, vin trafos malbela fino", al ili Jesuo responde diras: "Estas vi kiujn trafos malbela fino se vi ne ŝanĝas sintenon. Fakte Li diras "Neniel; sed se vi ne

konvertiĝos…", la verbo "konvertiĝi", uzata de la evangeliisto indikas la ŝanĝon en la orientado de ties ekzisto mem por ĝin meti je la servo de la aliuloj.

"vi ĉiuj tiel same pereos", do, "se vi ne ŝanĝas vian vivmanieron, vi ĉiuj trafos en malbelan finon, estas vi kiuj trafas en ĝin". Se al Jesuo oni parolis pri Galileanoj, nun Jesuo troviĝas en Jeruzalemo kaj Li tuŝas la dolorpunkton kaj Li priparolas ĝuste Jeruzalemon, kaj Li aludas kronikaĵon, la turon en Ŝiloaĥ kiu falis kaj mortigis dekok homojn. Li diras: "ĉu vi pensas, ke (tiuj dekok homoj) ili estis pekuloj pli ol ĉiuj homoj, kiuj loĝis en Jeruzalemo?".

Do, ĉi tie ne plu temas pri Galileanoj, pri kulpaj ribeluloj, sed ĉi tie temas pri Jeruzalemo kaj pri la loĝantoj en la sankta urbo. Nu, ankaŭ ĉi tie Jesuo ekskludas la dian punon kaj Li diras: "Neniel, mi diras al vi; sed se vi ne konvertiĝos," kaj la duan fojon Jesuo invitas al konvertiĝo, "vi ĉiuj ankaŭ pereos".

Do, oni priparolis al Jesuo la Galileanojn, kaj nun Jesuo parolas al tiuj rakontintoj pri la homoj loĝantaj en Jeruzalemo. Poste Jesuo aldonas parabolon kiu klare estas polemika mesaĝo kontraŭdiranta la anoncon kiun Sankta Johano la Baptisto faris pri la mesio. Ni rememoras ke Sankta Johano la Baptisto diris ke: "ĉiu arbo kiu ne portos bonajn fruktojn estos elhakita kaj ĵetita en la fajron".

Tiu estis la bildigo de la mesio. Temas pri mesio ekzekutisto; kaj ekzistas iun rilaton, iun analogion inter Dio kiu punas la pekojn kaj la mesio kiu venas forigi ĉiujn pekulojn. Nu Jesuo, ĝuste rilate al ĉio tio, eldiras tiun parabolon.

"Unu viro plantis", kiu scias kial la traduko de la Biblio de la Itala Episkopara Konferenco diras 'figarbon', sed vere ĝi diras "figujon plantitan en lia vinberĝardeno". La vinberĝardeno en la biblia lingvaĵo estas la bildo pri la izraela popolo, kaj ankaŭ la figarbo estas bildo pri Izraelo, aparte pri ĝia starigo, "kaj li venis, serĉante frukton sur ĝi".

Sankta Luko ne raportas la rakonton kiun skribas Sankta Marko kaj Sankta Mateo en ties evangelioj, kie Jesuo iras serĉi frukton, la figon kaj ĝin ne trovas, kaj Li nur trovas foliojn, sed li raportas iun parabolon kiu similas la alian. Estas tiu vinberĝardeno kie troviĝas figarbo, sed la figarbo ne donas fruktojn. "Kaj li diris al la vinberisto: Jen tri jarojn"- la numero tri indikas kompletan tempoperiodon - "mi venas, serĉante frukton sur ĉi tiu figarbo", ne 'sur tiu arbo', kiel tradukis IEK.

"Sur ĉi tiu figarbo", la evangeliisto substrekas la figarbon ĉar ĝi estas la bildo de Izraelo, de la izraela popolo. Kaj mi ilin ne trovas. Elhaku ĝin!". Jen ĉi tie estas strikta rilato al la anonco de Johano la Baptisto: "Ĉiu arbo kiu ne portas fruktojn", kaj ĉi tie ne estas fruktoj, sur ĉi tiu figarbo", "tiu estos forhakita", la verbo estas la sama kiun Sankta Luko uzas por Johano la Baptisto.

"Elhaku ĝin! Kial ĝi senutiligas ankaŭ la teron?"

La figarbo estas duoble neutila, ne nur ĝi ne havas fruktojn sed eĉ li senutiligas la teron. Kaj jen la respondo kiu spegulas la aktivecon kaj la agadon de Jesuo, "Sinjoro, lasu ĝin resti ankaŭ ĉi tiun jaron, ĝis mi fosos ĉirkaŭ ĝi kaj metos sterkon; kaj se ĝi poste donos frukton, bone; sed se ne, vi elhakos ĝin."

Nu, Jesuo ne venis por detrui, por forigi, sed Li venis por vivigi, kaj do Li venis ankaŭ por vivigi la popolamason - kaj tiu estas la bildo pri la popolamaso, pri la izraela popolamaso, kiu ne havas fruktojn, Jesuo ne venis porti juĝon al la popolo sed por oferdoni al ĝi kreskantan proponon je vivo.

Do, ne temas pri la anonco de Johano la Baptisto, pro kiu la arbo kiu ne havas fruktojn estos elhakita, sed se la arbo ne donos frukton la agado de la Sinjoro estas meti sterkon, fosi ĉirkaŭ ĝi kaj vidi ĉu ĝi, poste, sukcesos doni frukton.

Kaj li diras: “ni vidu se ĝi poste donos frukton. Eventuale, se ĝi tion ne faros, vi elhakos ĝin”. Do, la Sinjoro klopodas ĉiukaze komuniki vivon al sia popolo, al Izraelo, kaj al ĉiu kredanto je Li.